# *Kubaj a?toritatoj salutis la datrevenon de la sendependeco de Venezuelo*

*Image not found or type unknown*



**Ilustra bildo: Prensa Latina**

Havano, jul 6 (RHK) Kubaj a?toritatoj estritaj de la unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo (CC-PCC) kaj Prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel gratulis la popolon kaj

Registaro de Venezuelo pro la memorfesto, ?i-merkredon, la 212-a datreveno de la sendependi?o de la sudamerika nacio.

Per sia tvitera profilo, la kuba ?tatestro gratulis la bolivaran kaj ?avistan gvidadon de la prezidento Nicolás Maduro kaj la civil-armea unio, kiu scipovis venki la plej grandajn defiojn, li diris.

Díaz-Canel ratifis, ke tiu frata lando ?iam povas kalkuli je Kubo. Dume, la ?efministro de la antila insulo, Manuel Marrero Cruz, salutis la venezuelan popolon, kiun li priskribis kiel heroa.

Siaflanke, la Sekretario pri Organizo de la CC-PCC, Roberto Morales Ojeda, la?dis la agadon de la ?avistaj gvidantoj, kiuj en paco kaj kuni?o kun la bolivara militistaro revivigis la ideojn de Simón Bolívar (1783-1830) kaj Hugo Chávez(1954-2013).

En ?i tiu tago la sudamerika nacio festas la subskribon de la Ago de Deklaro pri sia sendependeco de la Krono de Hispanio, la 5-an de julio 1811, kaj la Tagon de la Bolivaraj Naciaj Armitaj Fortoj.

La Ago de Sendependeco de Venezuelo inkludas la subskribon de reprezentantoj de sep el la 10 provincoj apartenantaj al la Kapitaneco ?enerala de Venezuelo en Sudameriko, kiuj establis novan nacion bazitan sur respublikaj kaj federaciaj principoj.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/327575-kubaj-autoritatoj-salutis-la-datrevenon-de-la-sendependeco-de-venezuelo

Radio Habana Cuba